

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFANTA ★

N-ro 19 \* 13. Febr. 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

\* Eliras semajne. \*

## Esperantisto ne estas Senlingvulo en Fremda Lando. Esperanto en Siberia Militkaptitejo.

Jam en septembro 1920 ni ricevis interesan leteron, kiun ni pro manko de loko devis prokrasti ĝis nun. Sed, ĉar ĝi estas bonega pruvo pri la jam hodiaŭ ekzistanta grava valoro de Esperanto, ni kredas, ke ni ne rajtas prokrasti ĝin pli longe. Cetere ĝi bone taŭgas al propagandistoj por konvinki skeptikulojn.

\* \* \*

Kiel bulgara junulo, nur antaŭ nelonge alveninte Germanujon, mi ankoraŭ ne scipovas la germanan lingvon; sed dank' al Esperanto mi ne estas „izolita fremdulo“. Ĉiuj samurbaj samideanoj (en Halle a. S.) estas miaj servemaj amikoj. Mi eĉ povas vojaĝi kaj esplori la nekonatan landon per Esperanto.

De Bulgarujo mi korespondis jam kun s-ro Gerisch en Auerbach, kaj ni fariĝis korespondant-amikoj. Baldaŭ li invitis min viziti lin. Mi devis rifuzi, malgraŭ mia dezirego travojaĝi la belege aranĝitan Germanlandon, ĉar mi konvinkiĝis, ke en ĝi oni ne povas vojaĝi per franca kaj rusa lingvoj. Sed mia amiko skribis al mi la plej detalajn sciigojn pri la vagonar-movado, sendis al mi planojn, kaj mi, brulante je la deziro elprovi per-Esperantan ekskurson, decidis fari ĝin.

Antaŭ la billet-fenestreto de la stacidomo mi povas germane nur diri la vortojn: „Nach . . . dritte Klasse, bitte!“ (Al . . . tria klaso, mi petas.) Sammomente mi donas sufiĉe valoran monbileton, por ke la oficisto ne bezonu ankoraŭ da mono, ĉar tiam mi certe ne komprenus lin.

Sur la stacia perono mi povas ankoraŭ demandi: „Ist dieser Zug nach . . .?“ (Ĉu tiu ĉi vagonaro estas al . . .?)

Enirante en la vagonaron, mi aŭskultas, aŭskultegas la parolantajn germanojn, sed mi nenion komprenas, kvankam mi laboris ĝis nun en la germana lingvo trioble pli ol en Esperanto. Per la lasta mi facile kaj amike babilas kun la atendinta min verdstelano en la celita stacidomo.

### Esperanto en Militkaptita Tendaro en SIBERUJO.

Aŭdinte, ke estas *Esperantista Rondo* en la militkaptita tendaro de *Krasnaja Rječka*, apud *Flabarovsko*, Siberujo, mi klopodis kontaktiĝi kun miaj samideanoj; ĉar, kvankam mi estis tiam majoro en la brita armeo, mi bone sciis, ke inter esperantistoj la mondmalamo ne havas lokon.

La ĉiita tendaro estis tiam (1919) regata de la japanaj aŭtoritatoj, kaj la kaptitoj estis preskaŭ ĉiuj hungaraj oficiroj, je la nombro de ĉirkaŭ du mil.

Mi petis permeson viziti ilin, kiu permeso tuj estis donata.

Aranginte daton por mia vizito, unu tagon, matene, mi renkontis ĉe la tendara oficejo du aŭ tri anojn de la rondo kaj la prezidanton *Francisko Engelmann*, kiuj akceptis min tre amike. Mi trovis tie tre vigan rondon de ducentkelke da anoj.

Salutinte reciproke, ni kune foriris inspekti la tendaron kaj speciale la aktivigojn de la rondo.

Tiu ĉi vigla societo rezultis el la laboro de unu sola homo, s-ro Engelmann, kiu komencis ĝin per la prunedonado de sia lerneolibro al alia, por ke li povu ĝin kopii, kiu siavice transdonis la libron al tria ktp. Li starigis kursojn kaj zorgis la movadon, ĝis la anoj sumiĝis ducent.

La rondo redaktis tre belan gazeton, mane ilustritan. Iam, kiam la japana generalo *Kurita* vizitis la tendaron, li vidis la gazeton kaj proponis tricent „yen“ por ĝi, sed la redaktoroj ne akceptis la proponon. („Yen“ estas japana monero, kiu havas valoron je 1 Sm. norme.)

Dum la pasintaj jaroj tiuj ĉi kaptitoj vivis sub malbona stato, sed en la daŭro de la lasta jaro, post kiam la amerikanoj kaj poste la japanoj kontrolis la tendaron, ilia stato pliboniĝis. Sub tiaj lastaj cirkonstancoj ebligis al ili organizi

La unuan tagon mi travivis en Leipzig, kie la afabla s-ro Köpŝ montris al mi la plej gravajn vidajn kaj faciligis mian daŭrigveturon. La sekvantan tagon mi renkontis mian amikon en Reichenbach, kaj ni ĉesis esti nur korespondant-amikoj.

Tuj ni iris en la proksiman urbeton Mylau, kie la afablaj sinjoroj Linz kaj Streidt montris al mi la imperiestran kastelon kaj la grandegan viadukton — interesegajn vidindaĵojn por ĉiu fremdulo.

La saman vesperon estis organizata Esp. kunveno. Ĉeestis multaj samideanoj el Plauen, Auerbach kaj Gera. La pli multaj ne havis ĝis tiam okazon paroli kun alilandulo Esperanton, kaj ili volis elprovi nian interkomprenilon. La rezultatoj estis brilaj — de la unua vorto ni interkomprenis facilege. Post la salutvortoj mi plezure respondis al la multaj demandoj pri mia patrujo. La kunveno finis per amika amuzado.

La saman nokton mi daŭrigis al Auerbach. Tie mi gastis du tagojn ĉe mia amiko. Li donis al mi la okazon sperti la germanan familian vivmanieron kaj domarangojn. Samtempe mi vidis diversajn maloftajn Esperantojn kaj observis la fervoran laboradon de mia gast-akceptanto. Li korespondas kun pli ol 150 diverslandaj samideanoj! Kiel ĉefo de la prespropaganda sekcio de GEA li ĉiusemajne skribas artikolojn por la t. n. Esp. Anguloj de pli ol 100 germanaj gazetoj! Tiuj faktoj parolu pri la fervoreco, pri la necesa tempofero kaj monelspezo.

Vojaĝante al Plauen, mi deiris mallonge kun mia amiko en Jocketa — la belega „Vogelanda Svisujo“.

En Plauen la fervoraj s-roj Otto — maljuna paca batalanto — kaj la juna propagandisto s-ro Röder organizis multenombrian Esp. kunvenon. Ĉeestis ankaŭ kelkaj gazetistoj, interesuloj kaj eĉ nekreduloj. Ĉiuj devis konvinkiĝi pro la facila ebleco bonege interŝanĝi pensojn per nia inter-

diversajn aferojn, interalie universitatojn, teatrajn societon kaj tre lerian orkestron. Estis ankaŭ klubdomo kaj kafejo, tenisjo kaj piedpilkejo.

Unue, akompanate de eta grupo da esperantistoj, ni vizitis unu el la kafejoj, kie ni kuntrinkis kafon, kaj mi estis prezentata al aliaj amikoj. Ni inspektis la teatron, kiu estis ornamita kaj kolorigita de kelkaj el la kaptitoj, prepare por teatraĵo. La klubdomo, kiel ankaŭ la teatro, estis konstruita de ili, almenaŭ la internajoj, kiuj estis aranĝitaj tre artece.

La orkestro estis ekzercanta, kiam ni eniris kaj post kiam ni aŭskultis la muzikajn tiam ludatan, ili laŭpete ludis malnovegan muzikadon. Mi neniam povas forgesi la impreson, kiam mi tiam ricevis. Imagu orkestron, konsistantan el kelkaj kvardek homoj (la kompleta muzikistaro numerigis okdek), kiuj estis jam kaptitoj, multe da ili, dum jaroj, ludantaj muzikadon de sia propra parolado! Kiel bele estis!, kaj oni povis senti la kortusantan fervoron. Je kiu ili ludis. Inter aliaj aĵoj mi inspektis violonon tute faritan el tielanda ligno, alian preskaŭ same, nur la dorso estis el originala violono, ankaŭ violonĉelon tute el lokonatura ligno. Ili estis bonege faritaj kaj havis dolĉajn tonojn.

De tie ni iris al la kortbirdejo, speciala flankokupado de unu el la esperantistoj. Iu havis la ideon fotografi nin kaj tio sekve okazis. Kopio de tiu fotografo kune kun alia de iuj el la anoj kaj enskribita de ili restas kun mi kiel grandvalora memorajo de tiu vizito.

Denove ni daŭrigis nian promenon, ĝis ni alvenis ĉe la universitatejo, kaj de tie pasis al la esperantista ĝardeno. Tiu ĉi ĝardeno estis farita laŭ la formo de la verda stelo kun kampara kiosko centre, kaj ĉiuj vojetoj alkondukantaj al la kiosko. Tiam ni vizitis la pentrejon de unu el la anoj, kie ili pejis al mi, elektis du pentraĵojn, kiel memorajojn de mia vizito. Mi elektis unu tre karakteran pentraĵon, kiu prezentas malluman kaj densan arbaron. La altaj kaj rektaj

komprenilo. Mi devis ankaŭ kontentigi la grandan intereson pri mia patrujo.

Mi estis devigata gastigi ĉe s-ro Röder — liel li komprenas sian UEA-delegitan taskon. Li montris al mi la tipan junan fervorulon. Laŭ liaj vortoj mia vizito estis unu el la plej belaj tagoj de lia vivo, kaj, konvinkiĝinte nun pri la pozitiveco de nia afero, li laboros ankoraŭ pli fervore. Lia afabla edzino donis al mi la ŝatatan okazon vidi la estefikan germanan domarangojn kaj elprovi la faman germanan kuirelecon.

Post vizito de la urbaj rimarkindaĵoj, mi daŭrigis mian vojaĝon al Werdau. Renkontite de s-ro Naumann, mi vizitis la knabinan Esp. kurson de s-ro Stadler kaj estis mirigita pro la diligentecon kaj la bona sistemecon.

La vesperon mi partoprenis en la kurso de s-ro Naumann, kies lernantoj estas liaj gekolegoj kaj kelkaj aliaj ĝejunuloj. Post nur 10-hora lernado ili povis demandi min pri multaj interesajoj. Ĉu tio estas ebla per alia lingvo post dekobla lernotempo? La pli progresintaj lernantoj, ĝis tiam ne ankoraŭ ekzercinte la paroladon kaj nun elprovante la facilecon en la interkomprenado, fiell ekflamiĝis, ke ili komencis paroli nur Esperante eĉ kun kelneroj!

Reveninte en Halle a. S., mi estis ĉirkaŭata de miaj samlanduloj, scivolemaj nun ekscii mian nepre malfeliĉan senlingvan vojaĝon. Al mia rakonto ili ekkontraŭparolis: „Vi rakontas verajn fabelojn aŭ miraklojn. Ĉu estus ebla tiom da amikeco kaj gastemo inter la ĉiam-prop-okupataj germanoj, farita al nekonata fremdulo?“ Jes, mi elprovis ilin. Per Esperanto mi ne estas fremdulo pro la germana esperantistaro, sed ano de la sama homarfamilio.

Do, germanaj amikoj, bonvolu akcepti miajn korajn dankegojn pro via afablega akcepto. Via fervora laborado konvinkis min pri la sukcesplena venko de nia nobla korproksimigilo.

*Afanas D. Afanasov.*

arboj staras ĉirkaŭitaj de akvo kaj tra la mallumo aperas eklumeto, kiu devenas de punkto de lumo malproksima kvazaŭ de stelo, kies palaj radioj lumigas la flankojn de la arboj. La mallumeco figuras la malĝojon de kaptiteco, kaj la punkto da lumo, la tiaman vektitan esperon, ke ili baldaŭ estas liberigotaj.

Antaŭ tagmango ni vizitis diversajn anojn en iliaj propraj ĉambroj, kie mi ekrigardis la supercivitajn gazeton kaj ankaŭ diversajn\*karikaturojn kaj plumskizojn. Pasi tagmango mi rigardis tre belan skalan modelon de la tendaro, kompletan ĝis eĉ la telefonaj metalfadenoj. Nek estis la ĝardeno de la verda stelo forgesita. Unu el iliaj okupadoj estis potfardo kaj mi forportis specimenon de tio. Mi ne scias, de kie venis la argilo, eble de la ĉirkaŭaĵoj; sed la rezulto estis tre arteca. Mi inspektis la legadon, kie estis diversaj afiŝoj ĵnane ilustritaj, skribitaj en la hungara kaj ankaŭ la esperanta lingvo kaj kiuj estis tre interesantaj.

Fine, ni denove renkontis ĉe la kafejo kie ni interparolis ĝis la forira tempo.

Tiel finiĝis tre agrabla kaj memorinda tago. Mi ne povas rememori tiujn nomojn kaj rangojn de la amikoj kiujn mi renkontis tie, kaj mi petas al ili, ke ili pardonu al mi, se mi erare citos ilin; sed inter aliaj kaj krom s-ro Engelmann estis s-ro Stefano Mezey; majoro Schembro: supra li: Sinuer; d-ro Adalb. Liebus; kapt. Buchleimer; s-ro Boksaj Tivadaj; Josef Werner; Emanuel Berger; Josefo Kiss; Kostjál Alfred; Josef Dusza kaj Johanno Dobay; d-ro Teodoro Schwartz kaj s-ro Emerich Ehrenfried. Mi ankaŭ bone memoras s-ron Koranil, per kiu mi konaĝis kun la rondo.

Mi tre deziras scii pri la certa hejmalveno de miaj esperantistaj amikoj, kaj se kelkaj da ili legus tiun ĉi artikolon, eble ili bonvole sciigos sian alvenon al mi per poŝtkarto, adresita kiel sube, kaj se ili dezirus, ni povas daŭrigi la korespondadon.

EDWARD M. ROSHER,  
145 a Beulah Street, San Francisco, U. S. A.

## Tra la Mondo.

(Per arango de tiu ĉi nova rubriko en nia ĵurnalo ni ne celas prezenti al niaj legantoj lajn novaĵojn. Ĉerte vi jam legis la komunikaĵojn en viaj naciaj ĵurnaloj. Sed ni intencas per esperantlingva represo de la aktualaj stimuli niajn samideanojn al interesa esperantlingva konversacio pri ĉiuj nuntempaj okazoj. Ni esperas, ke pro tio la nova rubriko ne estos senutila.)

La termino por la konferenco en Londono estas fiksita je la unua de marto.

S-ro Paul Hymans sciigas la ĝen. sekr. de la Ligo de Nacioj, ke li transdonis la oficon de l' prezidanto de la Naciigita Konsilantaro al la ambasadoro de Brazilio en Parizo, s-ro da Cunha.

Nova karbokontrakto estas subskribita inter Germanio kaj Ĉeĥoslovakio. La malnova kontrakto finiĝis la 31. dec. kaj estis provizore plilongigita ĝis fino de januaro. La nova kontrakto, kiu validos ĝis 31. majo, estas starigita sur la bazo de la malnovaj kondiĉoj. Germanio liveras ĉiumonate 110 000 tunojn da karbo al Ĉeĥoslovakio kaj ricevas kompanse 220 000 t. da bohema brunkarbo.

B. Z. am Mittag komunikas, ke la vaporŝipo West-Arrow alvenis la 8. febr. matene en Bremen, kun 740 amerikaj laktobovinoj. En la Bremena haveno la bovinoj estis elsipigitaj.

El Moravio oni raportas, ke tie ĉeĥaj, polaj kaj germanaj komunistoj decidis fondon de propra komunisto partio sen konsidero de la nacieco kaj aliĝon al la Tria Internacio.

Danio agnoskis la respublikojn Estonio kaj Latvio.

La sinfejnaj interrompis ĉiujn telegrafajn kaj telefonajn rilatojn inter Belfast kaj la cetera Irlando. La rilatoj inter Belfast kaj Dublin tute ripozas.

Daily Herald komunikas el Ateno, ke tri delegitoj de la greka socialista partio, kiuj estis viziitintaj Moskvon, pereis dum la reveturo. La ŝipo, sur kiu ili troviĝis, estas en Nigra Maro kaptita de piratoj, kaj la delegitoj estas mortigitaj.

Daily News sciigas, ke la preparoj por starigo de araba registaro en Mezopotamio estas finitaj. Araba ŝtata konsilantaro jam nun regule kunsidas en Bagdad.

La vulkano Popocatepetl en Meksikio denove erupitis. Ĝia pinto estas ĉirkaŭita de dikaj fumoj. Vulkanaj erupcioj sur Isimo de Tehuantepek detruis grandan nombron da vilaĝoj kaj peretigis homojn.

## Komerco.

OSAKA (Jap.). La 12. nov., dank' al laboroj de s-roj Amano kaj Tanaka, malfermiĝis en la Supra Komercia Kolegio kurso kun 90 personoj sub gvidado de s-ro Hosoe, profesoro de la Kolegio, kaj por la kursanoj s-ro K. Fukuta faris paroladon pri la historio de Esp. movado.

### Krupp en la Frankfurta Foiro.

Kiel ni sciigas, la firmo Friedrich Krupp A.-G. en Essen konstruos, en kontakto kun la Frankfurta Foiro-Oficejo, en Frankfurt a. M. grandan modernan negoc- kaj foir-domon. La konstruaĵo trovos lokon proksime de la ĉefa stacidomo apud la alira strato al la foiro. Ankaŭ al liaj industriaj entreprenoj ĝi servos kiel ekspoziciejo. La firmo Krupp instalos en ĝi konstantian filion.

## La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Sidlovskaja.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. (15-a daŭrigo.)

"Ni atendu ankoraŭ, ĉielino," diris Mateo, "eble baldaŭ venos respondita letero de nia Osip, tiam eble ankaŭ por vi troviĝos laboro sur la kamparo. "Donu Dio!" unuvoĉe diris la knabino kaj Dima. "Kaj nun," daŭrigis Mateo, "Dima, skribu la adreson!"

Sed nun okazis io, kio malfluidigis la sangon en liaj vejnoj. Oni devas scii, ke la paperfolieto kun adreso estis konservata en la tabaksaketo de Mateo. Sed kaŭze de senĉesa frotado la skribitaĵo preskaŭ tute forviŝiĝis. La unua vorto "Minnesota" nur estis vidata, nenio plu. La paperfolion revizis komence Mateo, poste Dima, poste oni vokis la filinon de Bork, eble ŝi povus decifiri; volis helpi ankaŭ la nova konato de Dima, la irlandano, sed neniu povis ion legi sur la paperĉo.

"Kion do ni nun faros?" malgaje diris Mateo. Dima riproĉe ekrigardis lin kaj per la fingro frapetis al si la frunton. Mateo komprenis, ke la amiko ne volas lin insulti en societo, tial li nur montris per signoj, kiu opinion li havas pri la kapo de Mateo. En aliaj cirkonstancoj eble Mateo mem scius respondi, sed nun li sentis, ke pro lia kulpa ili ĉiuj tri estas pereontaj, kaj li ne diris plu vorton.

"He!" diris Dima kaj gratis al si la kapon. La samon faris Mateo. Sed la irlandano, viro videble decida, prenis koverton, skribis "Minnesota", al la farmbena laboristo el Rusujo Jozefo Lozinski" kaj diris:

"All right!"  
"Li diras, 'all right', i. e. 'tute bone'" ĝojis Dima, "sekve la letero bone alvenos." "Donu Dio! Tio estas Dia miraklo," diris Mateo.

## Printempa Granda Foiro en Praha.

(28. febr. ĝis 8. marto 1921.)

La signifo de la foiro de Praha estas donita de ĝia natura geografia situo — centro de Eŭropo — centro de internacia komerca komunikado inter orienta kaj okcidenta Eŭropo. La ĉeĥoslovaka respubliko reprezentas 70% de la industrio de la estinta Aŭstrio. En la lasta foiro, kiu okazis en septembro de la pasinta jaro, partoprenis 2558 ekspoziciantoj, kaj ĝi estis vizitata de 120 000 komerce interesigintaj aĉetantoj, kaj oni atingis la spezon de k. 1255 129 150.— Fremdlandaj aĉetantoj trovas tie la okazon havigi al si direktajn komercajn rilatojn kun komercaj kaj industriaj randoj ĉeĥoslovakaj. El fabrikoj reprezentataj en la foiro, kiuj plejparte interesos niajn aĉetantojn, ni nomas:

Vitrajn fabrikojn, lignon, ledon, piedvestaĵojn, komercaĵojn de Jablonec (Gablonz), lupolon, meblaron, teksajn fabrikojn, porcelanon, keramikon.

Plue ni akcentas, ke la ĉeĥoslovaka respubliko estas la unua ŝtato en Eŭropo koncerne la eksporton de sukero.

Por plifaciligi la viziton de la foiro oni atingis diversajn preferojn, avantaĝojn por fremdaj partoprenantoj. Ĉiujn informojn pri ili donas ĉeĥoslovakaj konsulejoj, reprezentantoj de la foiroj kaj foira oficejo (Esperanta Sekcio) en Praha I, Staroměstská radnice, Ĉeĥoslovakujo.

## Ekspozicio.

ŜIZUOKA (Jap.). Oni aranĝis Esp. Ekspozicion en la Urba Muzeo dum 5 tagoj, de la 30-a de novembro. Pli ol 7000 personoj vizitis ĝin.

## Lernejo.

TOKIO (Jap.). En Uaseda Universitato, unu el la du famaj privataj universitatoj en Japanio, formiĝis Esp. grupo el fervoraj samideanoj. Je 1 h. posttagmeze la 20-an de nov. oni aranĝis en klasalongo propagandan kunvenon, ĉe kiu parolis s-roj M. Ga, A. Akita, J. Narita, K. Ossaka, f-ino A. Alexander; kantis s-ro V. Eroŝenko kun gitaro. Preskaŭ 180 studentoj entuziasme aŭskultis. Baldaŭ komenciĝos Esp. kurso sub la gvido de s-ro N. Kaŭasaki. Oni elektis s-ron prof. S. Kacumata kiel prezidanton de la grupo.

ŜIAULIAI (Lit.). Dank' al klopodoj de s-ro V. Litevka, la direktoro de l' gimnazio afable permesis fondi gimnazian Esp. rondeton. Kurson partoprenas 15 p. — La 17. jan. estis aranĝata propaganda vespero. Estis ludata komedieto, deklamataj "La Vojo" kaj "Espero" (gimnaziano de la VIII-a klaso, s-ro Gaigalas); poste oni dancis. Ĉeestis ĝis 500 personoj, kiuj kun intereso rigardis la malgrandan modestan Esp. ekspozicion. Lerno-librojn oni aĉetis, kaj kelkaj anoj aliĝis. Enspezo estis sufiĉe bona: la mono akiritita nun ebligis fondi bibliotekon kaj aboni gazetojn.

### En Germanio.

Esperanto Asocio de l' Saksia Instruistaro.

Ĉefkunsido en januaro. Estraro: M. Sykora, 1-a prez., Sohrmann-Weinböhla (Sa.), 2-a prez., Thiel-Dresden-A 29, Weidentalsr. 20, poŝtekkonto Dresden 733, kas., Friebe-Dobritz-Dr., sekr., estraranoj: Hahn-Gohlis-Dr., Höfer-Dr., Jahn-Radebeul-Dr., Scheibler-Niederhermsdorf-Potschappel, Schön-herr-Dresden.

Krom tio la irlandano proponis al Dima kune iri por enpoŝtigi la leteron. Mateo rimarkis, ke, kiam ili estis elirantaj, la irlandano kun sia laŭ moda ĉapelo kaj kun bastoneto en la mano, kaj Dima en sia kileto kaj kun sia felĉapo, ili ambaŭ aspektis tiel strange, kvazaŭ Mateo vidus ilin en sonĝo. Precipe, kiam ĉe la sojlo la irlandano, kel kurbiĝinte, petis ke Dima eliru la unua, kaj Dima, imitante liajn manierojn, la samon proponis al la irlandano. Poste ili ambaŭ kune ekiris al la pordo, kaj ĉi tiun fojon Dima sukcesis eliri la unua. La irlandano forte frapis lian ŝultron kaj ekridegis.

Dima jetis fleran rigardon al Mateo.

### IX.

Tio okazis vendrede, jam post tagmezo. Mateo estis atendantia Dima'n, sed Dima kun la irlandano longe ne revenis. Mateo sidis ĉe fenestro, rigardis, kiel sur la stratoj homoj kuras tien kaj reen, freniĝas peze ŝarĝitaj veturiloj, grandaj kiel domoj, flugas vagonaroj. En la ĉielo, super la tegmentoj, aperis stelo. Roza, la filino de Bork, en la apuda ĉambro kovris tablon per blanka tablotuko, metis kandelojn en brile purigitajn kandelingojn kaj du panbulojn, kiujn ŝi kovris per blanka viŝtuko.

Ĉe la vido de ĉi tiuj preparoj subite io alfluis al la koro de Mateo. Li ekmemoris, ke hodiaŭ estas vendredo, kaj ke en lia patrolando ĉiuj hebreoj sin preparas tiamaniere por festo sabaton.

Efektive, baldaŭ Mr. Bork revenis el la sinagogo gravmiena, silentema kaj jaŭsajne tre malĝoja. Li staris kliniĝinte super la tablo kaj, ferminte la okulojn, balancigadis kaj zumadis siajn preĝojn, dum tra la fenestroj enpenetris bruado kaj kriado de l' strato kaj el la tria ĉambro aŭdiĝis ridanta voĉo de la juna John, kiu sur revenis el sia kolegio kaj rakontis tie al la fratino kaj al Anna ion gajigan. Alvokite de la patro, Roza eniris en la mangoĉambro kaj verŝis akvon sur liajn manojn. Li lavis la man-

## Esperanto Asocio de Germanaj Instruistoj.

Estraro: 1-a prez. A. Sohrmann-Weinböhla (Sa.), 2-a prez. W. Hahn-Gohlis-Dr., sekr. Friebe-Dobritz-Dr., kas. Thiel-Dresden. Jarkotizo nun 5 mk.

Ankaŭ en Saksujo la ministrio por publika instruado enketis pri la instruado de Esperanto en popollernejoj (II 145 a Allg.). La raportoj devas esti sendataj ĝis la 15-a de februaro 1921. Post kunlaborado la subskribinto havas la rajton ilin travidi.

Prof. d-ro Dietlerle-Leipzig parolis en distrikta instruista asocio Dresden-Land kaj havis plenan sukceson: la plej granda instruista asocio de Saksujo unuanime aprobis Esp. instruadon en la popola lernejo. Multe da ĝeinstruistoj nun komencas lerni.

S-ino Mainmen-Grenaa (Danujo) kolektis kaj sendis kakaon, sukerojn, kandelojn kaj monon, pro ke la 20 Esperanto-infanoj, kiuj estis pasintan someron en Danujo, povu festi kristsoleon. Estis bela arango kun enhavriĉa laŭvola programo en restoracio Knäsel-Dresden-Pl. Ankaŭ GEA helpis per mono. Nun oni denove sendis monon el Danujo, ĉar ĉiuj Esperanto-lerntanoj en Dresden kaj ĉirkaŭajo devas havi belan ekskurson. La danaj flegopatroj vokas denove la infanojn al Danujo. Vivu la homaĵo kaj la Esperantismo!

MAX SYKORA,

Dresden-N. 6, Martin Luther Str. 6/II.

HATTINGEN (Ruhr, Germ.). La 12. januaro komencis kurso en la popol-allernejo, gvidata de s-ro Sandrock el Essen. Je komenco ĉeestis 34 personoj; je la tria kurso-horo la 26. jan. la nombro de la vizitantoj altiĝis je 36.

## Societa Vivo.

MONTREUX (Svisio). La komenco de la monato februaro estis sukcesa por la Esp. movado. La 1-an formiĝis unua Esp. grupo en Montreux. Membroj-fondantoj estis en nombro de 27, plejparte laboristoj, fervojistoj kaj poŝtistoj. Kiel prezidanto estis elektata s-ro Konst. Frey, bone konata en laboristaj kaj sindikalistaj rondoj; sekr. s-ro Gust. Mestral; kasisto s-ro Gast. Messenger. Tuta grupo sin enskribis por la Esp. kursoj, kiuj komenciĝos la 10. febr., gvidotaj de loka del. de UEA. Kiel honora prezidanto de la nova grupo estis elektata d-ro Edm. Privat.

La 2. febr. la nova grupo havis la plezuron aŭdi en konferenco sian honoran prezidanton. S-ro E. Privat afable akceptis la inviton, en sia konferenco rakonti al la Montreux'anoj pri Esperanto. Kun sia kutima elokventeco la oratoro rakontis al la aŭdantaro pri nia movado, ĝia deveno, ĝia neceso esti enkondukata en la Societon de la Nacioj, pri la bezono lerni ĝin al ĉiuj, kiuj sincere deziras la fratan, senperan kunigon de popoloj. Tiu ĉi konferenco, kiu lumigis al multaj ĉeestantoj la celon, la altan ideon de Esperanto, restos por longtempe en koroj kaj memoro de ĉiuj. La kursanoj, vere, ricevis pli fervoran deziron elmeri la lingvon internacian, ricevis pli povan antaŭenpaŝon aliĝi al la tutmonda Esp. movado. Ĝi estis vera festo por la modestaj kursanoj, kiuj ĝin neniam forgesos.

La nova grupo frate, samideane, salutas la jam ekzistantajn.

ALEXANDRA MEXIN, del. UEA.  
Montreux (Svis.).

ojn, poste la pintojn de la fingroj, ŝprucigis akvon kaj ree murmuradis preĝojn, dum la knabino, verŝajne, ekmemoris ion ridindan kaj rigardis al la frato, kiu aliris la tablon kaj staris atendante, balancigante sur la piedfingroj. Poste ĉiuj altaliĝis. La gefratoj daŭrigis sian gajnan interparoladon. Bork sola de tempo al tempo ion mallalte murmuris, distranĉante bulbon aŭ panbulon, kaj ofte profunde spiris.

Mateo, observante la hebreon, rememoris la patrujon. Ankaŭ sabato festo ĉi tie ne estas tia kia ĉe ni, — li pensis, — kaj la hejma urbeta reaperis en lia imago tute viva. Ekbrilis la unua stelo super la mallumiginta arbaro, kaj la urbeta mallumigita, eĉ kamentuboj en la hebreaj dometoj ne eligas plu fumon. La sinagogo lumas, flavas kandeloj brulas en ĉiuj eĉ plej malriĉaj dometoj; hebreoj gravmienne revenas hejmen; sur la stratoj silentiĝas voĉoj kaj paŝoj, sed tra ĉiuj fenestroj oni povas vidi dommastron, en la mezo de sia tuta familio benantan la manĝon. En tiu tempo la pordoj estas malŝlositaj en ĉies domo, pro ke Abraham, Jakob kaj aliaj patriarkoj povu nerimarkite paŝi de unu dometo al alia kaj eniri kelkajn domojn. Konataj hebreoj certigis al Mateo, ke en ĉi tiuj horoj anĝeloj akompanas Abrahamon, kaj diabloj, kiel korvoj, flugas super la tegmentoj, ne kuragante alproksimiĝi al la sojlo.

Kompreneble, en la patrolando Mateo ridis pri tia sensencaĵo: ĉu Abraham, kiun respektas ankaŭ la kristanoj, bezonas viziti la malpurajn dometojn de la nebatitaj hebreoj? Sed hodiaŭ li sentis ofendon pro Bork, pro tio, ke eĉ hebreoj, popolo kun tiel forta kredo, ĉi tie forlasas siajn religiajn kutimojn.

La gefratoj rapide finis la vespermanĝon kaj forkuris en sian ĉambrojn; Bork restis sola. Ek-doloris la koro de Mateo ĉe la vido de la soleca, malgaja hebreo. Mr. Bork, kvazaŭ respondante al liajn pensojn, sin levis de la tablo kaj sidigis apud la fenestro.

(Daŭrigata.)

TALLINN (Est.). La 22-an de januaro Estonia Esperantista Unuiĝo „Espero“ aranĝis familian vesperfeston kun nur-Esperanta programo por siaj anoj kaj iliaj konatoj. La programo konsistis el hor- kaj sol-kantoj, deklamoj, parolado, muziko kaj esperantlingva teatraĵeto „Sinjoro Herkules“, kiun ludis la anoj de la unuiĝo, inter ili kelkaj konaataj Esperanton nur de kelkaj monatoj. Estas farita propono al „Espero“ de la Tut-Estona Junulara Ligo aranĝi kursojn de Esperanto en iliaejo. Krom tio estas projektataj kursoj por estonoj, germanoj ktp.

## Esperanto en Ruslando.

Laŭ la raporto de rusa gazeto „Izvestija“ de 14. jan. en urbo Moskva (Rusio) oni reregistradas ĉiujn esperantistojn, loĝantajn nuntempe en urbo Moskva. Esperantistoj sin registras en loĝejo 1-aj Tverskaja-Jamskaja 55-5. Post registrado okazos kunveno de esperantistoj, kaj oni reorganizas en Moskva la societon de esperantistoj.

A. KLIMAS.

## Kvina Konkursfesto en Eccles (Anglio)

(Sabato la 30-an de aprilo 1921).

La listo de la konkursoj enhavas: 1-4. originaloj, 5-7. kaj 17-20. tradukoj, 8-9. desegno, 10-12. muzikaj, 13-16. deklamo.

La konkursojn n-ro 1-4 povas partopreni ĉiu esperantisto tra la mondo, ĉiuj aliaj estas por esperantistoj loĝantaj en Granda Britujo.

Ĉiuj konkursoj devas esti en la manoj de la sekretario (s-ro R. Prys Griffiths, 57, Ramilies Road, Sefton Park, Liverpool) ne pli malfrue ol la 10-an de aprilo.

Ĉiuj manuskriptoj devas esti skribataj klare sur unu flanko de la papero kaj subskribataj per pseŭdonimo. La ĝusta nomo kaj adreso kun la ago de la verkinto estu metata en sigelitan koverton, kiu elmontras ekstere la pseŭdonimon de la konkurso, kaj alsendata samtempe kiel la konkurso.

Kun la konkursoj devas esti sendataj 9 pencoj por poŝtelspezoj.

La n-roj 1-4 estas: 1. originala poemo, iu temo (premio 6 ŝil.), 2. originala teatraĵo, unu aŭ du aktoj (6 ŝil.), 3. tezo „Ligo de Nacioj“ (4 ŝil.), 4. originala rakonto (6 ŝil.).

Ĉiu gajninto de premio devas elekti Esperant-ajojn, kies valoro egalas la premion.

## Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun aldonado de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

### LETERO EL TURKIUJO.

Konstantinopolo, 27. jan. 1921.

Nuntempe Turkujo estas aktuale da landoj, sub du diversaj registaroj. La unu, tiu de la sultano kaj Konstantinopola registaro, estas tiu, pri kiu oni ordinare pensas, preparolante la landon, kaj kompreneble estas la sola, kun kiu la ceteraj registaroj oficiale traktas. Tiu ĉi estas la Turkujo, kies senditoj subskribis la kontrakton de Sèvres; sed ĝis nun tiu ĉi traktato ne ricevis la sankcion de la parlamento.

Unu el la turkaj generaloj, Mustafa Kemal, malkaŝe rifuzis konfirmiĝi al la postuloj de tiu ĉi kontrakto, iris Anatolion kun kelkaj sekvantoj kaj kontraŭstaris la Entente-on. Tiu ĉi ago kompreneble estis ribelema kontraŭ la turka registaro, kiu tial estis devigata, kun premo flanko de la Entente, militi kontraŭ li. Sed la milito ne estis tulkora kaj plenumis malmuldon.

Mustafa Kemal nuntempe estas stariginta sian sendependan parlamenton en Angoro, de kie li formale interrilatis kun la Kaukazaj ŝtatoj kaj kun Moskvo. Li kontrolas la plimulton de la lando, kaj li estas estimata pli kaj pli de la popoloj de aliaj partoj. Ekzemple, dum la lastatempa balotado apud Broussa la turka ĵurnalaro aludis al la soldatoj de Mustafa Kemal kiel la „turka“ armeo, anstataŭ la „ribelantoj“.

En la fino de novembro la Konstantinopola registaro sendis mision al Angoro, por ke ili trovu bazon de interkonsento kun Mustafa Kemal; sed ĝis nun oni ne ricevis certan novaĵon pri ĝia sukceso aŭ alie. Se la registaro ricevis ian novaĵon, ĝi ne konigis ĝin, kaj la gazetaro montras maltrankvilecon, ĉar famoj ĉirkaŭiras, laŭ kiuj la tuta misianaro aliĝis al Mustafa Kemal!

Ne utilus trovi interkonsenton inter la Okcidentaj Nacioj kaj registaro ĉe Konstantinopolo, kiu ne povus obeigi sian aŭtoritaton tra la plimulto de la lando. Mustafa Kemal postulas radikalajn ŝanĝojn en la kontrakto de Sèvres, inter ili, ke la voĉdonado en Smyrne fariĝu tuj anstataŭ post kvinjara okupado de la grekoj, kaj ke Turkujo havu reprezentanton je la komiso de la Dardaneloj.

Granda okazo por la solvo de la malfacilaĵoj de Turkujo prezentas sin en la propono de konferenco por diskuto de la tuta demando ĉe Londono en februaro, al kiu estos invitataj reprezentantoj de Grekujo kaj de Turkujo. Ni esperu, ke la lastaj estu de ambaŭ — la Kemal'a kaj la Konstantinopola — registaroj. Nur per tiaj diskutoj oni ellaboros daŭran pac-kontrakton. C. M. C.

### Peto.

Samideanoj, kiuj havas duoblan numeron 14 de ET, estas petataj, bonvole resendi ĝin por alioj, kiuj ĝin ne posedas.

## Scienco.

### NOVA KOMPREENO DE LA VIVO KAJ ĜIA PRAKTIKA SIGNIFO POR LA HIGIENO.

(8-a daŭrigo.)

(PRES-ERARO. Bonvolu legi en n-ro 18, dua paĝo, unua kolono, linio 22 de supre: „agadoj de la sentoj“ anstataŭ „sencoj“.)

Sed krom la elektro kiel ĉefa forto de la korpo nun venas, laŭ mia opinio, ankoraŭ du aliaj fortoj: la varmo kaj la elasteco, ebligantaj nur kune kun la elektro la vimmanifestigojn de nia korpo. Jen tri fortoj efikantaj tie ĉe unu kun la alia<sup>1)</sup> kiel sinergetoj kaj funkciigantaj nian korpon; el la tri komparoj kun horloĝo, kun kaloria kaj elektra maŝino ĉiu estas railigita.

Tiu ĉi kompreno de la korpa funkciado nature havas tre eĝan gravecon por la medicina praktiko. Estos la ĉefa tasko de la estonta kuracisto kaj higienisto, zorgi, ke la homa elektrolito de sango kaj limfo estu konservata en bona ordo, por ke la korpo ricevu sufiĉege la elektrajn funkciadajn fortojn bezonatajn.

Estas strange, per kiu delikata instinkto la naturkuracmetodo ĉiam akcentis la signifon de la nutraj saloj, aparahtaj tie ĉe en tute nova lumo. La nutraj saloj, la malesimata cindrolino de la medicina oficiala, en vero ne estas sole konstrubsubstancoj, sed la faktaj fortodonantoj de la korpo. Albumino, karbonhidratoj kaj graso, la laŭdiraj fortodonantoj de la oficiala skolo, estas nenio alia-ol konstrubsubstancoj kaj varmoliverantoj. Sekve la nun aplikata priklariga kalkulo estas nur ĝusta parte. Mankas ĝin kiel grava kompleto mezuri fortokvanton konforman al la elektrolitenhavo de la nutraĵo laŭ miliamperoj. Same tiel la fortobalanco de nia korpo ĝis nun prialkulita nur laŭ kalorioj ne estas ĝusta. Per la kalorioj estas mezurata nur la varmokvanto, kaj mankas ankoraŭ la kvanto da elektro, akirita de la korpo kiel ĉefunkciilo el la sanga kaj limfa elektrolito. Ankaŭ tie ĉe la kaloria kvanto devas esti reduktata en miliamperoj, nur tiam ni ricevas plenan bildon pri la tuta fortobalanco de la korpo.

La skolmedicino ĉiam parolas nur pri azotekvilibrilo. Sed pli grava ol la azotekvilibrilo estas la iona egalpezo de la sangosalaj (bazoj kaj acidoj). La elektraj potencialoj ekestas per la disocio de la saloj en kationoj kaj anionoj kaj estas neanstaŭtebligaj por la vivfunkciodo. Eĉ se la azotekvilibrilo estas perfektega, tamen la vivo perdiga, en la momento, kiam ne ekzistas pli elektraj potencialoj, ekz. ĉe la salmalsamorto la eksperimenta besto malgraŭ la eŝanta azotekvilibrilo pereas iom post iom por funkciada elcerpiĝo. La elektraj potencialoj devas esti seninterrompe garantiataj per la ionekvilibrilo, por ke la vivo ne forkuru. Ĉar acidoj estas superflue formataj ĉe stofŝanĝo kaj ĉe ĉiuj korpaj kaj spiritaĵ streĉadoj (ankaŭ ĉe febro, ĉagreno ktp.), la danĝero de ĝenerala kaj loka acidvenenigo (acidozo) ekestas, se ne profilaktas estas zorgata per sufiĉa importo de bazoj (kationoj) por la ionegalpezo.

La hodiaŭa skolo donas ĉi tiujn aĵojn nur nekomplete. Per tio la tuta sciencia nutrada doktrino ricevas nepre aliĝintan aspekton, kaj sin montras, ke la oficiala sciencia nutrada doktrino estas fundamente falsa. Nur nun oni vidas kun plena evidenco, kiel ĝuste la naturkuracmetodo ĉiam konsideris la plengrajnan panon la sole valoriga. La subila pano estas senvalorigita nutraĵo, mankas al ĝi granda parto de la nutradaj saloj entenataj en la entjera grengrajno. Tiel oni povas bone klarigi, ke la konstanta ĝuo de subila pano devas bredi en pliiganta grado statojn de neŭrasteno, tute ne kalkulite la terura dent-kario, kiun ĝi elvokis kune kun la arte farita sukero. La neŭrasteno laŭ ĉi tiu percepto estas malsano ekestanta per elektrolitmalhavo. La korpo ĉiam pli kaj pli perdas la forton, formi fluojn elektrajn, cerbo kaj medolo ne plu sufiĉe funkcias kiel centralo elektra. Tiel la neŭrastenulo simple estas homo, kiu ne plu estas disponanta pri sufiĉe da fluo elektra en sia korpo.

En la saman direkton iras malĝustaj kulmoroj ekz. elbrogj la legomojn ŝtelante al la korpo la nutradajn salojn; la arte farita sukero raffina ne entenante plu nutradajn salojn<sup>2)</sup>; la mola trinkakvo, malriĉa je kalko kaj aliaj saloj. Nun ni komprenas nur la sukcesan efikon de multe da fontkuracadoj.

La tuta oficiala nutrada direkto antaŭ la mond-milito havis sian ĉefsimptomon en tio, ke ĝi sisteme kaj nekonscie celis trompi la popolon pri la plej gravaj nutradaj saloj. Tial kreskanta demineralisacio kaj ĉiam pli grandaj konstituciaj degeneraĵoj sin montrantaj ĉefe kiel anemio, neŭrasteno kaj denikario. Sed ankaŭ la konstantan karcinom-pliigon, oni devas rilatigi al tio, ĉar la urino de la karcinom-malsanuloj montras frapantan malriĉigon je mineralsubstancoj ĉe samtempe granda acidkiemo.

(Finota.)

D-ro W. WINSCH.

<sup>1)</sup> En miaj ambaŭ broŝuroj „Pri varmokulturo“ kaj pri „la arto plilongigi la vivon“ mi tion pli detalis.

<sup>2)</sup> Laŭ sciencia fizika klarigo elasto propradire ne estas energio, sed nur eco de materialo; jen praktike neniu esenca diferenco, ĉar la elasta materialo havas la econ efiki kiel akumulato por meĥanika forto.

<sup>3)</sup> La sola alivalora produkto el la sukerrapo estas la rapsuko, kiun oni preferus manĝi anstataŭ la arte farita sukero.

## Recenzoj

### LIBROJ.

ELEKTITAJ POEMOJ de Heinrich Heine. Trad. el la germana lingvo Friedrich Pillath. Dua, kompletigita eldono. (Nova Esp. Biblioteko n-ro 6.) 46 pĝ. 11:15 cm. Esperanto-Verlag Friedrich Eltersek, Berlino S 89. Prezo: bele kartonita 3 mk. kaj 20%, T. (multekosteca aligo).

En aŭtuno 1914 samideano Pillath publikigis la unuan eldonon de sia libro, kaj jam ses jarojn poste por elcerpiĝo nova eldono estis necesa. Bela pruvo por la boneco de l' poemareto. La unua eldono enhavis 15 el la plej belaj poemoj de l' germana poeto. La dua enhavas 25.

Per la aĵono de ok novaj poetoj Pillath ree pruvis, ke li majstre solvis la malfacilan taskon traduki la belajn versojn de Heine.

Legante la versojn de la „libro de kantoj“ ni ĝemas, ni ploras, nia koro tremante enpenetras en la sanktejon de la homa animo. Tie ĝi ripozas.

Same tion sentas la tradukinto; li estas unu el la malmultaj homoj, kiuj funde komprenas la kompatindan poeton, kies vojo surtera estis ŝtoniĉa (ŝtonoza) kaj kies vivo estis doloriĉa (doloroza) pro malfeliĉo propra kaj pro insulatoj flanko de homaj individuoj.

En la entaŭparolo de la unua eldono la aŭtoro trafis rifutas la mok-elidirojn de la kontraŭuloj defendante la poeton, kiu tiam erare estas suferinta.

Mi ne miras, ke ankaŭ la tradukoj de la novaj versoj estas modelaj. Bona interpretisto estas tiu, kiu tiam profunde amas la poeton kaj liajn poemojn. Ĉio estas precize laŭ la modelo; lingvo, ritmo kaj rimo. Pillath preskaŭ laŭvorte tradukis kaj sukcesis precize redoni la pensojn de l' poeto. Tial estas troa modesteco, se li diras, ke liaj tradukoj neniel egalvaloras la originalojn. Male, Eksterlandanoj kun granda ĝuo legos la beleĝajn poemojn kaj plene ekkonos la animon de l' poeto kaj la profundan sencan, kiu ĉirkaŭvolvas la poemaron kiel odoranta floriglando.

Mi konsilas al ĉiuj ĝesamideanoj tuj havigi al si la rekomendindan verketon; ĝi beligos la vesperan ripozhoron de l' vintrologo, kiam ni, sidante hejmece malantaŭ la forno, meditas kaj revas pri la vivo, la sorto kaj — la amo.

G. AJUL.

### GAZETOJ.

#### ESPERANTA FINNLANDO. Jan.

La unuan numeron de l' nova jaro la eldonantoj dediĉis al la Esperantista Akademio, kiel signon de nia espero, ke per ĝia ĵus aperinta Deklaracio nia supera lingva institucio eniras en novan epokon — epokon de produktiva agado por la bono de nia lingvo. — Sciigo de la redakcio, ke „Esperanta Finnlando“ eble fariĝos „Esperanta Baltiko“ (organo krom por Finnlando ankaŭ por Estonio, Latvio kaj Litovio), laŭ propono ricevita el Litovio kaj laŭ konsento el Estonio.

#### ESPERANTO. Jan.

Enhavas tre interesajn dokumentojn pri la kunsidoj de la komisiono n-ro 11 ĉe la Ligo de Nacioj kaj pri la ĝenerala kunsido, kiuj pritrakis la problemon de internacia lingvo.

#### FRANCA ESPERANTISTO. Febr.

La kroniko fariĝis pli ampleksa, do — ŝajnas — la Esp. vivo ankaŭ en Francio revigiliĝis. Ni ĝojas legante, ke la „Esp. Centra Librejo“ povas nun reeldoni diversajn valorajn verkojn de Zamenhof kaj de aliaj aŭtoroj. Ni rimarkas, ke „F. E.“ daŭre ignoras nian ĵurnalon; ni ne povas klarigi al ni la kialon.

#### HISPANA ESPERANTISTO. Jan.

Enhavas interesan artikolon pri la monaĝejo San Juan de Peña, kun ilustraĵoj. Artikoloj pri Ĉekoslovakio. (Ni ne konsentas kun tia skribo, ĉar ĝi koincidas kun „Ĉeko“, ekz. bankĉeko, poŝtĉeko; se oni volas eviti la certe malagrablan „h“, oni devus skribi „ĉesko“.) La gazeto enhavas ankaŭ bildon de la grupo esperantista de Huesca.

#### HUNGARA ESPERANTISTO. Jan.

Kvankam eta kaj modesta, la revuo estas sufiĉe interesa. Krom literaturaĵoj la n-ro enhavas interesajn raportojn pri Zamenhof-Vespero kaj Silvestro-Festo en Budapeŝto, kiuj donis belajn ekzemplojn de reciproka helpemo kaj vera samideaneco.

#### LA PROGRESO. Jan.

La ĉefartikolo estas akra polemiko de s-ro Titl kontraŭ s-ro Ellersiek en Berlino pri artikolo pri la XIII-a Kongreso aperinta en la januara kajero de „Esperanto Praktiko“. Ni ne volas esplori kulpon aŭ nekulpajn. sed ire bedaŭras, ke samideanoj en samideanaj gazetoj publike interpolemikis per tiaj akuzoj.

#### NEDERLAND-ESPERANTO.

Nederlanda ĉiusemajna propagandfolieto en nederlanda lingvo kaj en Esperanto. Ni ricevis paketon de diversaj numeroj depost 30. sept. 1920, la lastaj de 15, 20, kaj 27. jan.

#### Aliaj gazetoj ricevitaj:

Nowe Tory, Bromberg-Bydgoszcz.  
Négoce, Paris.  
Ido Korespondan Revuo, Esch (Luksb.).  
Suislan Idisto, Zürich.



Gasto: „Ĉi tiu omaro ja havas nur unu pinĉilon.“

Kelnero: „La alian ĝi perdis en batalo kun alia omaro.“

Gasto: „Do, bone, alportu al mi la venkinton!“

(El „Berl. Ill. Zeitung“.)

## Pri Landnomoj.

Mi estas rimarkinta en kelkaj verkoj, ke landnomoj ne ĉiam estas ĝuste esprimitaj. Ekzemple, anstataŭ „Litovio“ oni uzas „Litvo“, anstataŭ „Latvio“ oni uzas „Letonio“ ktp.)\*

Tia uzado estas farata versajne pro simpla nescio. En „Sinjoro Tadeo“ mi trovis la rimarkon de la tradukanto, ke vorton „litvano“ oni ne konfuzu kun „litovo“. Similan konsideron mi ankaŭ trovis en verko „Vivo de Zamenhof“. Do tuta malkomprenigo devenas de tio, ke laŭ pola lingvo la nomo de nia lando sonas kiel „Litvo“ kaj la nomo de latvoj laŭ franca lingvo sonas kiel „Letonio“. Se oni povas uzi la vorton „Litvo“, tiam mi ankaŭ havas plenan rajton uzi la vorton „Lenkio“ anstataŭ „Polio“, „Prancuzio“ anstataŭ „Francio“, ĉar tio pli bone konformas al sonoj de litova lingvo. A. Klimas, Kaunas.

\*) „Litovio“ en litova oni esprimas „Lietuva“ (elparolu: Ljetuva aŭ Letuva). Ĉu ne estas pli ĝuste skribi: Letuvio aŭ Lituvio? Sed mi opinias, ke esprimo „Litovio“ povas resti, ĉar ĝi ne estas tiom erariga kaj due ĝi jam ekiris en Esp. literaturo sian civilitaton.

## Grava Propono.

Ni akcelas enkonduki Esperanton kiel komerc-lingvon. Por sukcesi ĉiuturilate ni devas evidenti la disvastiĝon de nia lingvo. Bonega rimedo por ĉi tiu celo estas, ke ĉiu esperantisto en sia laborejo (kontoro, oficejo, fabriko, vendejo) prizorgas, ke neniu poŝtajo sendota eksterlandan, eliru sen glumarko aŭ alia avizo kun la atengito, ke oni korespondas per Esperanto.

LEONO FUNKEN.

## Parolejo.

52.

FLARI TABAKON.

(Respondo al s-ro Lippmann.)

Mi ne konsentas kun la de vi donitaj klarigoj, kiuj min tute ne kontentigas. Ĝi la fakto, ke nia mortinta majstro uzis la esprimon „flari tabakon“, ne estas pruvo de ĝusteco. „Errare humanum est“.

La esprimo „flari tabakon“ en la senco: per naz-enspirado suprenfiri tabakon en la „flarilon“, estas logike tute ne defendebla.

Certe, mi scias taŭgan anstataŭigon; mi eĉ havas kelkajn vortojn en mia provizejo, ekz. priz, aŭ pri, aŭ snufi.

Eĉ se vi donas (kaj rajte donas) al la vorto „flari“ la duan signifon „enspiri per la nazo por senti la odoron de io“, vi tamen per tio ne povas esprimi la signifon „priz“.

— Ekz. blindulo eniras ĉambrojn, en kiu sidas lumanta sinjoro. Tuj li flaras tabakon. Eniras post li alia sinjoro, kiu suferas pro aĉa nazkataro. Li flaras — nenio. Tamen li volas ekscii, ĉu la lumanta sinjoro cindrigas bonkvilatan cigaron aŭ sekigitan bambuon (pro la altaŭtabakprezoj). Li ekprenas la cigaron (ne estis bambuo!) kun la afabia permeso de la posedanto kaj forte enspiras per la nazo la odoron de l' tabako. Malgraŭ la kataro li nun iomete flaris, sed ne prizis, ĉar lia nazo ne suprenfiris la cigaron, sed nur la fumon. Por prizis estas necese, suprenfiri materialon, t. e. tabakpulvorojn, en la vizagbeligon.

Mi konkludas: „flari“ — senti la odoron de io, aŭ enspiri per la nazo por senti la odoron de io; „priz“ — enspirante suprenfiri tabakpulvorojn en la nazon por stimuli la mukhutojn.

Ĉiuj eŭropaj lingvoj havas specialajn esprimojn por „priz“. Ni pliriĉigu nian lingvon per nepre necesaj novaj vortradikoj.

Oni bonvolu priz, se mia respondo oni surprizis, kaj ekheligis en onia cerbo; mi speris, ke mi sen ofta prizado ne estus

G. AJLIL.

53.

AL S-RO LIPPMANN.

E. S. Pri la „tial ke“ mi estas kulpa (!), ĝin mi uzis por eviti la tre malagrablan ripeton de „ĉar“ en du sinkvantaj paragrafoj. Ĉu grave? — Laŭ deziro de ne-franca akademiemo mi anstataŭigis „iu“ per „kiu“, ĉar ĝi ŝajnas al mi tute iuiga. Ĉu erare? Malgraŭ via argumentado mi ne opinias. — Ni ne malpliaciligu la uzon de nia lingvo per tro da severeco! — Kun intereso mi legas viajn lingvajn notojn, kiuj montras profundan konon de nia lingvo.

Kun kora saluto

TH. CART.

54.

FIDINDAJ STATISTIKOJ.

Grava manko sentata de propagandistoj estas la bezono de fidindaj kaj precizaj statistikoj. Semajna gazeto povus forigi tiun mankon. Do ET laras bonan servon, se ĝi kolektis statistikon pri la instruado de Esperanto en la lernejoj, la aprobo de la lingvo ĉe korporacioj, politikaj partioj ktp.

Lastatempe, en kelkaj landoj edukadaj administracioj aprobis la fakultativan instruadon de nia lingvo en la lernejoj. Oni citas la fakton en ET, kiam ĝi okazas, sed estus multe pli utile, se oni ankaŭ donus de tempo al tempo en tabela formo liston de tiaj administracioj kaj landoj kaj ankaŭ nomus precize la lernejojn, en kiuj oni instruas Esperanton. La raportantoj indiku la amplekson aŭ specon de administracio preparolata. Ekzemple, se oni parolas pri Ministro de Edukado en Hessen, ne supozu, ke allandano komos ĝin egale bone ŝtato Germanio, ni Eklektiko oni povas esti certa, ke neniu brilo komprenas ĝin nunan politikan „staron“. Se oni raportas pri la „mezlernejoj“ de Hungario, estas absolute necese klarigi, kion signifas lia esprimo. Simile, se oni parolas pri la finlingvaj lernejoj de Finnlando, ĉu ne finno tuj sin demandas, ĉu tio signifas eble dek lernejojn kontraŭ eble cent svedlingvaj lernejoj? Kiom da allandanoj necese scias, ke Finnlando estas dulingva lando? Komprenable, se raportoj rilatas nur al mezgrada (duagrada) lernejo, oni devus tion indiki.

Antaŭ ĉio, estu preciza kaj ne troigu!

(P. J. Cameron, London.)

RIM DE RED. Tre prave s-ro Cameron diras, ke mankas al ni fidindaj statistikoj. Volonte ni plenumus lian deziron, kiu certe estas ankaŭ la deziro de multaj aliaj, kaj kolektus tiajn statistikojn, se ne la rekta havigo de la necesaj informoj por kompleta statistiko estus por ni tre malfacila; ĉar ET ankoraŭ ne estas por tio sulice disvastigita. Kaj duonkompletaj statistikoj li ne multe valoras.

Ni konsentas kun s-ro Cameron, ke raportantoj pri tiel gravaj aferoj skribu plejbone precize kaj laŭvere.

La Koncerne la ŝtato Germanio, ni Eklektiko: Hessen estas germana liberŝtato konsistanta el du partoj, unu norde de la rivero Maino, alta ŝtataŭflanke de l' Rejno. Areo 7688 kvadratkilometroj; loĝantaro 1 280 000; ĉefurbo Darmstadt; aliaj urboj Mainz, Worms, Offenbach, Giessen.

## Brazilio!

Sinjoro J. BLOOMFIELD, komisiisto, deziras reprezenti eksterlandajn firmojn.

Adreso: Strato Rosario, 152, 1-a etaĝo, RIO DE JANEIRO, Brazilio.

Telegrafa adreso: TATU.

## Novaj Parfumoj Idol

por la eksportado al ĉiuj landoj.

Por reklamo oni sendas aŭfrankite laŭ peto: 1 boteto, super-bonkval. esenc., F. F. 14.— 1 boteto, super-bonkval. esenc., F. F. 6.— 1 specimeno, kvintesenc. (ekstra) F. F. 2.50

Pago per ĉeko aŭ bankbileto (mk., ŝil. ktp.) — Granda rabato por gravaj mendoj. —

Petu al:

H. Bidaux,

ekskluziva eksportisto,

Paris, 5 Place d'Aligre.

Oni petas reprezentantojn en ĉiuj landoj.

## CIGAROJ!

Kun la eksterlando serĉas diversajn

rilatojn sinjorino Mühlpfordt, #

Cigar-fabriko,

Neumarkt 50, Merseburg/Saale, Germ.

Ĉiuspecaj poŝtkartoj,

## Leter-Paperoj

kopiaj paperoj kaj inksorbiloj estas malkare aĉeteblaj ĉe

Jozefo Major \* Budapest IX, Remete str. 56-11-4.

Mi vendas prefere grandkvante. Al inform-petoj aldonu respond-elspezon.

## Marius Nielsen

Baumaterialien-Maschinen

Eilenburg bei Leipzig (Germ.)

rekondas stajn maŝinojn por fabriki tegolojn kaj plataĵojn ĉiumaniere, same kiel fasonajn aŭ kavajn ŝtonojn el kalko kaj sablo.

Oni petu pli detalajn informojn.

## MAŝINOJN

por agrikulturo, elektro-teknikajn artiklojn, kolorigilojn, ludajojn ktp. liveras al ĉiuj landoj

Rudolf Meyer, Frankfurt a. M.-West

(Germ.), Rödelheimer Landstr. 24.

## Filatelistoj, atentu!

Varsovio, Polio, Krak-Przedm. 10  
Adolfo Oberrotman

povas liveri al seriozaj propagandaj filatelistoj kolekton da diversspecaj poŝtmarkoj, ĝis 50 serioj, diversaj: Ukrainaj, rusaj jubileaj Romanoff, rusaj sovjetaj, kaj ĵus aperintaj en Litovio de generalo Zeligowski. Ankaŭ malnovaj moneroj. La pago per bankbiletoj, respond-kuponoj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj.

## Abonojn al ET

oni bonvolu pagi per resp.-kup. (15 por 10 n-roj) aŭ prefere per ŝtataj bankbiletoj. Ni liveros por 20 gmk. 12 n-rojn de ET. Por 10 ŝil., 10 sv. fk., 10 pesetoj, 10 nordaj kronoj aŭ 5 hfl. 50 n-rojn, por 10 fr. fk. aŭ 1 dolaro 25 n-rojn, por 10 italiaj liroj 15 n-rojn, por 10 finnaj mk. 10 n-rojn. — Tiuj ĉi prezoj valoras por ĉiuj landoj kun valuto pli alta ol la germana. Al Germanio, la Balkanojn aŭ la Baltikaj landoj ni liveros 10 n-rojn por 10 gmk., al Ĉeĥoslovakio 15 n-rojn por 20 Kč. Specialajn prezojn por Aŭstrio, Hungario, Polio kaj Estonio oni demandu ĉe niaj respektivaj reprezentantoj.

Niaj Abonejoj.

AŬSTRIO.

Esp.-Societo por Stirio, Graz, Schönaugasse 6.

ĈEĤOSLOVAKIO.

Otto Sklenčka, Hradec Kralové.

Prof. J. Süßner, Saaz 687.

ESTONIO.

Helmi Drezon, sekretario de Est. Esp. Unuiĝo „Espero“, Riiüiti t. 6, Tallinn.

GERMANIO.

Postschekkonto Köln 708 65, Teo Jung, Horrem Bez. Köln.

HUNGARIO.

Paŭlo Balkanyi, Budapest, Hajos-utca 15, II, 2.

POLIO.

Adolfo Oberrotman, Warszawa, Krak. Przedm. 10.

PORTUGALIO.

Agencia Esperantista, Silva & Carreira, Rua da Assunção 42, 3.

## ★ Gesamideanoj! ★

\*\*\*\*\*

Kiu scias ion pri s-an Izso Brüll, kiu estis persekuita de hungara registaro, iu turnu sin al

Hungara Esp. Societo Laborista, VII.,

Dohany-str. 71/L, Budapest.

La societo dankeme akceptas ĉiujn sciigojn pri s-ano J. Brüll.

Anoncetoj.

SENPAGE mi sendas Manifeston de Nederlandaj Kontraŭ-Militaristoj al ĉiu, kiu petas ĝin per il. poŝtkarto. G. P. de Bruin, Alieeweg 9, Enschede (Holando).

HUNGARA LITERATURO. Pro malaliginta valuto hungara ire malkaraj Esp. libroj el hungara literaturo. Petu proponojn de Hungara Esp. Servo, Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.

GLUMARKOJ DE Poŝtkongreso en Budapeŝto 1921, poŝtkartoserio havebla ĉe Hungara Esp. Servo. Petu proponojn de Paŭlo Balkanyi, Budapest VI, Hajos-utca 15-II-2.

ŜANĜO DE ADRESO. S-ro Ksaw. Alfus (Krakow, Pedzichow 22) sciigas ĉiujn interesitojn pri ŝanĝo de sia adreso: ĝi estas: Ksaw. Alfus, Wied-Bank Zwiak, Tarnov (Polujo). La ŝanĝo koncernas ankaŭ korespondadon kun „E.E.A.S.“

DEZIRAS KORESPONDI AŬ INTERŜANĜI:

S-ro F. Derr, Düsseldorf (Germ.), Düsseldorf 65, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

Vicento Orlando, Santa Fe 77, Bahía Blanca (Argentino), deziras korespondi kun anoj de ĉiuj landoj.

Antonio Lattanzio, Darragueira 245, Bahía Blanca (Argent.), deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanoj.

Isidro Fernandez, Pte. Roca 67, Bahía Blanca (Argentino), deziras korespondadon kun samideanoj en ĉiuj landoj.

Poŝtmarkojn interŝanĝas A. Villafranca, str. B. de Irigoyen, 1105, Buenos Aires, Argentina Respubliko. — Minimumo sendo 100 malsamaj pm de sola lando.

S-ro Fritz Schlingelhoff, Düsseldorf 52 (Germ.), Siemens Str. 48, deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj por interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn, Esp. gazetojn kaj sigelmarkojn, memorajojn.

Kiu sendas al mi 50 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos ankaŭ 50 poŝtmarkojn de Germanio. Mi tuj respondas. Walter Dick, Plauen i. V. (Germ.), Forststrasse 84.

A. Kurassov, Riesenkaempfer, n-ro 29-1-5, Tallinn (Reval), Estonio, interŝanĝas poŝtmarkojn.

Kolomano Toth, Budapest IX, Gyp-eu. 11-1-19, per poŝtkartoj il. kaj poŝtmarkoj.

Emeriko Strasser, Budapest IX, Remete u. 56-11-8, deziras korespondi per poŝtkartoj il. leteroj, poŝtkartoj, gazetoj naĉlingvaj kaj Esperantaj, ŝlosiloj. Tuj respondos.

S-ano Hemi Remers, Düsseldorf (Germ.), Luisenstr. 97, deziras korespondi per leteroj kaj il. poŝtkartoj kun la tuta mondo, ankaŭ ricevi Esp. gazetojn kaj literaturojn.

Dezirantoj korespondadi, interŝanĝi pri Siberio, pri Rusio, pri regado de Kolĉak kaj aliaj generaloj, povas komenci interkorespondadon kun s-ro B. Najdin, Kuzneĉkaja 65, Omsk, Siberio.

S-ro Paul Münten, Düsseldorf 45 (Germ.), Fürstenwall 119, deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj por interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn, Esp. gazetojn kaj sigelmarkojn, memorajojn.

S-ro Michaelo Zsomboky, Kispest, Bercsenyi u. 55, Hung., korespondas kun socialistoj il. ĉiuj landoj.

Varsovio, Polio, str. Ziota 51, s-ro Konstanty Chmielewski, deziras interŝanĝi kun diversaj esperantistoj tujmondaj.

Kiu sendos al mi diversajn poŝtmarkojn militajn ricevos de mi rekompence diversajn neuzitajn kartojn ilustritajn.

S-ro Paul Münten, Düsseldorf 45 (Germ.), Fürstenwall 119, deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj por interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn, Esp. gazetojn kaj sigelmarkojn, memorajojn.

S-ro Michaelo Zsomboky, Kispest, Bercsenyi u. 55, Hung., korespondas kun socialistoj il. ĉiuj landoj.

Varsovio, Polio, str. Ziota 51, s-ro Konstanty Chmielewski, deziras interŝanĝi kun diversaj esperantistoj tujmondaj.

Kiu sendos al mi diversajn poŝtmarkojn militajn ricevos de mi rekompence diversajn neuzitajn kartojn ilustritajn.

S-ro Paul Münten, Düsseldorf 45 (Germ.), Fürstenwall 119, deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj por interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn, Esp. gazetojn kaj sigelmarkojn, memorajojn.

S-ro Michaelo Zsomboky, Kispest, Bercsenyi u. 55, Hung., korespondas kun socialistoj il. ĉiuj landoj.

Varsovio, Polio, str. Ziota 51, s-ro Konstanty Chmielewski, deziras interŝanĝi kun diversaj esperantistoj tujmondaj.

Kiu sendos al mi diversajn poŝtmarkojn militajn ricevos de mi rekompence diversajn neuzitajn kartojn ilustritajn.

S-ro Paul Münten, Düsseldorf 45 (Germ.), Fürstenwall 119, deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj por interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn, Esp. gazetojn kaj sigelmarkojn, memorajojn.

S-ro Michaelo Zsomboky, Kispest, Bercsenyi u. 55, Hung., korespondas kun socialistoj il. ĉiuj landoj.

Varsovio, Polio, str. Ziota 51, s-ro Konstanty Chmielewski, deziras interŝanĝi kun diversaj esperantistoj tujmondaj.

Kiu sendos al mi diversajn poŝtmarkojn militajn ricevos de mi rekompence diversajn neuzitajn kartojn ilustritajn.

## Anoncetoj en ET

kostas po kvadrat-centimetro 1 gmk., 0,10 hfl., 0,20 fk., 0,20 n. kr., 2 pencoj, 2 hung. kr., 1 ĉ. kr., 3 pol. mk., ktp. Rabato ĝis 40% ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj; krome speciala rabato de 20% por niaj abonantoj.

ANONCETOJ kostas: 2-foja enpresio: 3 gmk., 1/3 hfl., 1 fk., 1 ŝil., 6 hung. kr., 3 ĉ. kr., 10 pol. mk. ktp. 5-foja enpresio kostas la duoblon.